

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭde la 12-an de marto 2020 per Skype.

(Protokolo aprobata la 16-an de aprilo 2020)

Partoprenis:

Amelie Matt en Tromsø
Herman Ranæs en Trondheim
Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim ĝis tagorda punkto 7.C.
Lars Sandbakk en Stavanger
Mario Machlik en Tromsø

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 9-an de januaro

Aprobata.

2. Ekonomio

Nun la kasisto kaj la vicprezidanto havas aliron ankaŭ al la kontoj 0530.42.32724, 7877.06.79590 ĉe la banko DNB. La samaj personoj ricevis ankaŭ aliron al la kontoj de NEL en la banko Skagen. La kasisto proponas, ke anstataŭ la konto 7877.06.79590 ni havu ŝparkonton, kiun li uzos por kolekti mondeponaĵojn de nuntempe malaktivaj kluboj.

Ekestis demando, kiel oni elkalkulas la sumon, kiun NJE ricevas de NEL kiel apogon. En nia statuto staras: *I begynnelsen av kalenderåret skal seksjonen motta et beløp fra forbundet, som utgjør en viss prosentandel av ungdomsmedlemmenes samlede kontingent. Landsmøtet fastsetter prosentandelen etter anbefaling fra forbundsstyret.* Mario provos esplori kiam kaj kion decidis la Landa Kunveno pri tio.

3. Jarkalkuloj 2018, 2019

La kasisto finis la laboron ankaŭ pri la jarkalkulo 2019. La jarkalkulon 2018 la estraro jam aprobis rete la 16-an de februaro. Ni decidis plusendi ilin al nia revizoro Ulf Stenhaug kaj al la redaktoro de nia membrogazeto por publikigo.

4. Jarraportoj 2018, 2019

La jarraporto de 2018 estas preta por publikigo. Claude sendis la parton pri ekonomio kaj Mario verkis la resumon. Pri la jarraporto 2019 ni komencos okupiĝi dum la venonta estrara interkonsiliĝo.

5. Prizorgo de la tombo de Haldor Midthus

La estraro decidis, ke ni mendu la flegadon de la tombo kontraŭ 1550,- kronoj. Haldor Midthus estis la fondinto de Esperanto en Norvegio, kaj ni sentas respondecon konservi lian memoron. Ni devus esplori, ĉu mem la memorŝtono bezonus baldaŭ riparon, renovigon.

6. Skandinava kongreso 2021

Mario ricevis retroŝton de Peter Wraae, gvidanto de DEA, pri planoj de la 3-a Skandinava kongreso. Ĝi okazos en konventum (www.konventum.dk) en Elsingoro la 14-16-an de majo 2021. Ni planas landan kongreson tiun jaron, pri kio respondecas la klubo en Oslo. Ni kun ili esploras la eblecon havi nian Landan Kunvenon en Danio, eventuale kombini la du aranĝojn tiel, ke post nia landa kongreso en Oslo oni povu ekskursi al la Skandinava kongreso. Bedaŭrinde la dato ne estas tute optimala pro la proksimeco al la nacia tago en Norvegio. Amelie proponis, ke ni ankaŭ povus pritaksi uzi Skajp-konferencon por la Landa Kunveno.

7. Eventualaĵoj

- A, Herman proponis, ke la aprobata protokolo estu kunsendota kun la tagordo. Ni tiel faros ekde la venonta fojo.
- B, Herman instalas novan version de la programo *LibreOffice* al la oficeja komputilo fine de februaro. Tio nun bone funkcias por registri la membrojn.
- C, Lars sukcese organizis transporton de 30 kilogramoj da libroj el la postlasita biblioteko de Anne Karin al Esperantonia. Li ankaŭ ekhavis kontakton kun esperantisto el Kongo, al kiu oni povos sendi librojn, se la afranko ne kostos tro multe.
- D, La slovaka eldoninto de la norveglingva broŝuro *Oppdag Esperanto* ofertas al ni aĉeti la reston de la stoko (85 ekzemplerojn kontraŭ 85 eŭroj + sendokostoj). Ni volonte aĉetos la broŝuron, ĉar ĝi komencas elĉerpiĝi en la oficejo.

La interkonsiliĝo daŭris 20:30 - 22:00

La venonta interkonsiliĝo okazos la 16-an de aprilo 2020 je la 20.30.

Raportis Mario Machlik